

Karaj verdaj raŭpoj, karaj papilioj


En mia ĝardeno, estas multaj arboj, kiujn hirundovostaj amas, kiel japanaj piproj kaj mandarinanoj. Mi volas, ke la hirundovostaj papilioj venu kaj demetu ovojn, kaj mi volas kreskigi ilin. Mi antaŭe havis multajn Raŭpojn ĉiun jaron, sed dum la lastaj 10 jaroj mi tute ne vidis ilin. Mi suspektis, ke tio estis pro la radiado de la nuklea akcidento.

Ĉi-jare, mi trovis kelkajn raŭpojn por la unua fojo post longa tempo, kaj mi tre feliĉas konservi ilin en mia ĉambro. La ĵus eloviĝintaj raupoj estas tro malgrandaj, do ili kresku en la japana pipro-arbo kaj ili eventuale fariĝos nigraj. Kiam ili fariĝas verdaj kaj grandaj, mi kaptas ilin kaj konservas ilin en mia ĉambro, ĉar se ili restos ekstere, foje lacertoj manĝas ilin aŭ hirunvostaj vespoj demetas ovon ĉe la raŭpoj kaj manĝas ilin.

Mi konservas la raŭpojn en granda kartona skatolo kaj nutras ilin. Antaŭ ol ili krizalidiĝas, ili forlasas la foliojn kaj serĉas bonan lokon por krizalidi. Mi pensas, ke ili volas havi sufiĉe da spaco por siaj etendiĝontaj flugiloj. Kelkfoje ili eskapas el la skatolo. Unu el miaj raŭpoj gluiĝas al la kruro de la seĝo kiel vi povas vidi en la foto.

Estas tre malfacile vidi la raupojn krizalidiĝi, ĉar por tio mi devas rigardadi ilin seninterrompe. Mi vidis tion nur unu fojon. Raŭpo ĉirkaŭigas la fadenon el sia buŝo ĉirkaŭ la kolo, kaj la momenton, kiam la fadeno tuŝas la sulkon ĉe la kolo, ĝi ĉesas tiun agon, kvazaŭ ĝi dirus : "Mi sukcesis !" Vere tio estas spektaklo.

La klizalidoj dormas aŭ maturiĝas dum unu semajno, kaj poste belaj papilioj aperas. Post apero, ili etendas siajn flugilojn, restas tie ĝis la flugiloj sufiĉe malmoliĝas, kaj poste forflugas en la bluan ĉielon. Mi estas tre feliĉa en tiu momento. Mi vokas laŭte: "Revenu al mia domo kaj demetu ovojn!"





Maldekstre sur la planko estas haŭto, kiun la raŭpo demetis.

